// SVISA ESPERANTO-SOCIETO
INFORMAS

N-ro 3/1996 MAJO-JUNIO

## "LETERO DE LEGANTO"

### Kiel informi pri esperanto?

Sub tiu titolo aperis speciala eldono de SES INFORMAS (marto 1996, en kiu Marco Picasso resumas la enhavon de la seminario, okazinta en Lucerno komence de januaro 1995. Mi partoprenis tiun staĝon kaj atendis tiun resumon. Finfine ĝi aperis, pli bone malfrue ol neniam. Mi dankas pro la publikigo kaj volus provoki pluajn paŝojn.

Ne sufiĉas organizi interesan seminarion, kvankam laŭdinde, ne sufiĉas publikigi resumon, kvankam dankinde, eĉ ne sufiĉas eldoni iam libron pri tiu temo. Kiel informi pri Esperanto devus esti porjekto de laborgrupo de SES, kiu studas la problemaron kaj ellaboras instrumentaron.

Tio necesas ĉefe por la svisgermana parto. Danke al KCE la Romandio disponas pri sufiĉaj fortoj, kaj ankaŭ en Tiĉino vivas korifeoj.

La svisa movado bezonas freŝan sangon, novajn adeptojn. Esperanto kaj Esperantio atimgis evolustaton, valoron kaj utilon, kiuj povus interesi homojn de 2000. Ni devus metode kaj sisteme informi kaj instrui, ne batali kaj propagandi.

Marco Picasso mem skribas en la resumo interalie: "...estus bone, se specifaj komisionoj ekzamenus la mesaĝojn, kaj en tiuj komisionoj devus partopreni spertuloj pri reklamado aŭ pri psikologio ... Necesas formi kadrojn,precipe inter la junularo, kiuj estas la surmerkatigantoj de la internacia lingvo. Praktike ni devas trovi grupojn, kiuj povas ĝui Esperanton. Kaj tiel plu". -Bruno Graf-

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
23.5. Invito al gesinjoroj Senn
27.6. Minigolfo

**BELLINZONA:**

Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.
11.5.17.00h kaj 8.6.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
7.5.19.30h kaj 4.6.19.30h

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio MIGROS, Neumarkt, Bielo 3, ĉiun ĵaŭdon 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" Genève:**
En Institut National genevois, Promenade du Pin 1, subteretaĝo (haltejo Athénée de busoj 3 kaj 5).
10.5.19.00h Monata kunveno
14.6.19.00h Monata kunveno.

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**

ĉiun duan lundon en la monato la Esperanto-konversacio-emuloj povas sin renkonti ĉe Yvette Goy, quai de L'indépendance 6, en Cully, Tel: 021/799 19 36.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES:**
En restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse8 en Emmenbrücke, (kun escepto de BIG BEN).
8.5.14.00-16.00 en BIG BEN, paroliga kunveno. Gvido Franz Brügger.
23.5.20.00h "NOVAJ IMPULSOJ, NOVAJ HORIZONTOJ": Parolos Carla Müller.
12.6.14.00-16.00h en BIG BEN: Paroliga kunveno kun Franz Brügger.
27.6.20.00h "VANKUVERO KAJ KALIFORNIO".Pre-

lego kun lumbildoj. Parolos Ernst Glättli el Brugg.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Untere Bahnhofstrasse 18.

8.5.20.00h Monata kunveno. Temo elektota.
12.6.20.00h Monata kunveno: "MEMORBILDOJ PRI KALIFORNIO", kun lumbildoj. Prelegos Ernst Glättli, Brugg.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
En la propra kunvenejo en Eisengasse 22, subteretaĝo, kie okazas ĉiuj renkontiĝoj.

13.5.19.15h Monata kunveno: Kvizo.
20.5.19.15h Publika informvespero pri Esperanto.
25./26./27.5. (sabato-lundo) Pentekosta Semajnfino en ĉaledo "Notre Abri" kun Esperanto-Societo Lausanne. (En regiono de Vilars).
10.6.19.15h Monata kunveno.
24.6.19.15h Lingvaj ekszercoj kaj libera kunveno.

oo0oo

**KARAJ GESAMIDEANOJ**, ĉi-tie estas la Esperanto-Societo "FLAMO" el Polujo! Ni eldonas kaj disvendas etajn esperantaĵojn kaj nature sciigas tion al ĉiuj eblaj gesamideanoj. Niaj eldonaĵoj ne estas multekostaj, sed plaĉaj kaj utilaj, ekzemple la Esperantokarto kun bela kaj plaĉa stampo, algluiĝaj verdaj steloj ktp. (La Esperantokarto estas tre bela/ rimarko de la red). Turnu vin al:
Esperanto-Societo "FLAMO", Pk 16,
87100 Torun 1, Pollando.

oo0oo

**ĈU VI SCIAS,**

ke vi povas aboni la sekvantajn Esperanto-periodaĵojn

| | |
|---|---|
| **EL POPOLA ĈINIO** | **LA GAZETO** |
| **eventoj** | **LA ONDO DE ESPERANTO** |
| **HEROLDO de esperanto** | **MONATO** |
| **JUNA AMIKO** | **RUSLANDA ESPERANTISTO** |

ĉe la Svisa Peranto
Christoph Scheidegger
Im Schleedorn 6
CH-4224 Nenzlingen (Pc-n-ro 40-52612-7)

oo0oo

**NI FUNEBRAS:**

Ni havas la taskon anonci, ke vendrede la 16-an de februaro 1996, post longa malsano, forlasis nin por ĉiam nia multmerita honora membro

**HELENE DE SASSI-REBER**

4an de julio 1907 ĝis 16a de februaro 1996

Helene De sassi dum multaj jaroj estis fidela kaj aktiva membro de nia societo kaj disponigis sin por diversaj oficoj en la estraro de nia Zurika Esperanto-Societo,sed ankaŭ por aliaj asocioj kaj organizaĵoj de la Esperanto-movado kaj ekzemple la naturamikoj. Laste ĝis la jaro 1992, dum kiu ŝi atingis sian 85an vivojaron, ŝi kun sindonemo plenumis la taskon de kasistino de ESZ, ofico por kiu en ĉiu asocio nur malfacile trobeblas kandidatoj.

La Esperanto-Societo Zuriko

oo0oo

**B E T - 32** (Antaŭanonco)

La BALTAJ ESPERANTO-TAGOJ/BET-32 havas la celojn interŝanĝi sperton pri esperantista agado, perfektiĝi en Esperanto,starigi taskojn por la Esperantomovado en la Baltaj Landoj, kaj interese pasigi la tempon en Esperantujo.
BET-32 okazos de la 2-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1996, en JüRMALA, 30-minuta veturo per elektrotrajno de la centra fervoja stacidomo de RIGA.
(La informilo n-ro 1 kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bonvolu aldoni al vi afrankitan koverton. Dankon.) -FL-

oo0oo

**KORESPONDDEZIROJ EL LITOVIO**


Mara Timermane, KR.Valdemara 145/I-32, Riga LV-1013 Litovio:
Mi deziras trovi leteramikojn en Svislando. Mi estas 35-jara s-ino, biologo laŭ profesio, kaj mi interesiĝas pri turismo kaj naturkuracado. Plue mi tre ŝatus ekscii pri etnografio, kulturo kaj naturo en via lando, interŝanĝi opiniojn pri sendependa disvastigado de nutraĵ-produktoj kaj kosmetiko.
Kaj samloke: F-ino Una Timermane, 14-jara, komencantino. Mi interesiĝas pri kosmetiko, moderna muziko kaj vojaĝoj.

oo0oo

**La plej aktuala, utila kaj tutmonda gazeto por lernantoj**

# juna amiko

**aperas kvaronjare sur 32 ĝis 36 ilustritaj paĝoj**




## amiko de junuloj kaj lernantoj

- ★ interesaj, amuzaj rakontoj
- ★ dialogoj kaj teatraĵetoj
- ★ enigmoj kun valoraj premioj
- ★ rol-ludoj kaj kantoj por grupa uzo
- ★ ĉio en simpla lingvaĵo (mil radikoj)
- ★ plum-amikoj en ĉiuj kontinentoj
- ★ korespond-petoj aperas senpage
- ★ ni aperigos viajn verkojn

## amiko por la instruistoj

- provizas regulan fonton de preta cel-lingva lego-materialo
- profundigas viajn instruaĵojn en aliaj viglaj kuntekstoj
- instigas viajn lernantojn aktive paroli Esperanton, pere de skeĉoj, rol-ludoj kaj partoprenigaj kaj diskutigaj ekzercoj
- aplikas praktike modernajn situaci-komunikajn teknikojn el la nuntempa mondo de lingvo-instruado

**Nova rubriko por la plej junaj**

INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO

el San Diego, Kalifornio

## amiko por la movado

- ★ ligas lernejajn klasojn kun la aktiva esperantistaro
- ★ akcelas la rejunigon de la parol-komunumo
- ★ portas informojn pri aranĝoj kaj servoj interesaj por junuloj
- ★ stimulas korespondadon, ĝemeligojn kaj internaciajn kontaktojn

**PETO EL Minsk**

Estimataj gesamideanoj,
Esperantistaj anoj de Biblio-studrondo el Minsk deziras kontakti kristanojn en Svislando. Ni ankaŭ volonte akceptus donace librojn ktp por la ĵus fondita biblioteko. Bonvolu turni vin al:
S-ro Alexey Tolmachov, P.O.-Box 386 Minsk 113, BY-220113 Belaruś CIS.

Koran antaŭdankon.

oo0oo

**E V E N T O J**

Ĉu vi volas esti informita?
EVENTOJ volas helpi al vi en tio. Ni raportas pri la eventoj de la movado, pri la aperantaj novaj servoj kaj utilig-eblecoj, pri la novaĵoj de UEA kaj TEJO! Ni aparte atentas pri la aplikado de la lingvo, pri la Esperanto-aranĝoj, pri la agado de fakaj asocioj.
Por Svislando Chr. Scheidegger, im Schleedorn 6, 4224 Nenzlingen (Pc 40-52612-7)estas nia peranto. La jarabono estas 53 CHF.
Ni ĝojus bonvenigi vin baldaŭ. -EVENTOJ-

oo0oo

KORESPONDPETO:

Estimataj geamikoj,

Mi havas 62 jarojn kaj mi estas edzigita. Tre volonte mi ŝatus korespondi pri fremdlingvoj, religioj, vegetarismo kaj literaturo. Sinceran dankon antaŭe.
Mia adreso: S-ro James Brennan
23 Kathrose Drive
Willowdale
Ontario M2J 3P4 Canado

oo0oo

(detala programo)

# Teatro en esperanto cent jarojn poste

## Eger (Hungario), 05-09 julio 1996

**vendredon la 5an de julio**
ekde 11h00 funkcias akceptejo kaj libroservo
15h00 turisma vizito en Eger // asembleo de Esperanta PEN-Centro (nepublika)
18h30 vespermanĝa paŭzo
20h30 interkona vespero: kun kantoj de Anjo Amika kaj kun ludoj.

**sabaton la 6an de julio**
9h00 inaŭguro
9h30 Georges Lagrange: *Trafo kaj maltrafo en la esperanto-teatro*
11h30 bonveniga aperitivo
12h00 tagmanĝa paŭzo
15h00 *La signifo de la teatro en minora lingvo*
debato organizita de Esperanta PEN-Centro kun hungaraj verkistoj kaj kritiki
18h30 vespermanĝa paŭzo
20h00 teatra prezento de Andres Bickel
21h15 teatra prezento de Vida Jerman

**dimanĉon la 7an de julio**
9h00 Zofia Banet Fornalowa: *La unuaj jaroj de nia teatro: 1896-1914*
10h30 Ljubomir Trifonĉovski: *Pri la esperanta pupteatro*
12h00 tagmanĝa paŭzo
16h30 teatra prezento de Jerzy Fornal
18h00 teatra prezento de Bulgara Esperanto-Teatro
19h30 vespermanĝa paŭzo
20h30 vizito en la hejmo de la Taŭra Sango (vinkeloj)

**lundon la 8an de julio**
ekde 8h30 duontaga ekskurso (kotizo aparte pagenda)
kun prezento de lastaj novaĵoj en nia libromerkato
libera posttagmezo
18h30 vespermanĝo
20h00 teatra prezento de Bulgara Esperanto-Teatro
21h30 Giorgio Silfer: prezento de *La spegulo de Velodajo*

**mardon la 9an de julio**
9h00 Belka Baleva: *Perfektiĝo en esperanto per teatraj formoj*
10h30 ronda tablo: *Kien la esperanto-teatro?* Gvidas István Nemere
12hoo fermo.



**HEROLDO DE ESPERANTO**

**MARTO, 1996**

**senpaga ekzemplero de heroldo**

**ELEKTO EL PLI OL 200 ESPERANTO-KUNVENOJ 1996**

La printempa duobla numero de "HEROLDO DE ESPERANTO" enhavas detalan liston de ĉiuj plej gravaj feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto ĉie en la mondo.

La listo por 1996 detaligas datojn,adresojn kaj programojn, kaj priskribas pli ol 200 aranĝojn.

Oni povas senpage ricevi la supre menciitan duoblan numeron, marpoŝte, mendante ĝin ĉe la redakcio (Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (Torino) Italio.)

Kiel konate, "Heroldo de Esperanto", fondita en 1920, estas la plej populara gazeto en la internacia lingvo kaj estas eldonata de laŭleĝe registrita kultura societo sen profita celo.

A. Fighiera-Sikorska,
redaktorino

oo0oo

**JEN KORESPOND-PETO EL BULGARIO**

F-ino Asia Kondova, Pk 64, 1680 Sofio deziras trovi gekorespondantojn en Svislando. Mi estas 22-jara studentino pri ekologio kaj dezirus korespondadi pri ĉiuj temoj.Mi antaŭdankas kaj salutas tutkore.

oo0oo

**TEMO: Esperantostaĝoj en departemento Hérault (Francio)**

Kara samideano, ĉu vi konsentus disaŭdigi, aperigi kaj sciigi al viaj legantoj la jenajn informojn?

1) Esperanto-restado kun diversnivelaj esperantokursoj okazos en feriejo **"Batipaume"** ĉe la mediteranea marbordo, de la **12-a** (posttagmeze) ĝis la **16-a** (tagmeze) **de junio 1996.**
Informas Cercle Biterrois d'Espéranto,
9, Rue Georges Picot, F-34500 Beziers.

2) **Internacia Esperanto-Semajno** kun 3-nivelaj kursoj okazos en feriejo **"La Lazaret"**, en Sete (Hérault), de **lundo la 9-a ĝis lundo la 16-a de septembro 1996.**
Jen bonega okazo sin bani en la Mediteranea Maro, en internacia etoso, por (ek)lerni la Internacian Lingvon, por ripozi aŭ viziti tre agrablan regionon.
Informas Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5, Rue du Docteur Roux,
F-34000 Montpellier. -Louis Ensuque-

oo0oo




SF: Gertr.Eggenberger
Wurmbühlstrasse 10
8405 Winterthur

**PARTOPRENU EN LA IFK EN DEN HAAG (NL)**

Niaj nederlandaj geamikoj klopodas aranĝi interesan, neforgeseblan kongreson! Petu informilojn kaj aliĝilojn de la redaktorino de SF.

# ROK-gazet'

**Eurokka - Esperanto-Rok-Asocio - FR-31450 DONNEVILLE - Francio - tel./faks. +33 61.81.95.65**

Kara!

Jen la nova freŝa ***ROK-gazet'*** ~ ni esperas ke ĝi plaĉos al vi. Tiu ĉi speciala numero prezentas la muzikgrupojn partoprenintajn en ***Vinilkosmo-Kompil'*** **Vol. 1** aperinta en marto.

Ni profitas la okazon por anonci ankaŭ la ekpretigon de la **2-a volumo**, kies apero antaŭvidatas por 1996 (vidu la koncernan antaŭmendilon).

Kun tiu ĉi numero aperas ankaŭ la nova katalogo de **Vinilkosmo**, kiu prezentas ĉiujn produktaĵojn haveblaj ĉe ni.

Krome ni kalkulas pri via helpo kaj kunlaboro por diskonigi kaj disvastigi la informojn pri ***ROK-gazet'*** kaj **Vinilkosmo**, por instigi pliajn abonantojn kaj mendantojn; por tion sukcesi, ĉiuj rimedoj validas: gaztoj, informiloj, anoncoj en E-kluboj kaj en radioj, ktp.

Vi povas multobligi la ***ROK-gazet'*-Abonilon** kaj **Vinilkosmo-Mendilojn**.

Ni invitas vin ankaŭ partopreni en la redaktado de ***ROK-gazet'***: sendu artikolojn, informojn, novaĵojn, ktp .

Via kunlaboro estas gravega kaj helpegas nin.

Antaŭdankojn!

Plej rok-amikajn salutojn de la respondeculo de Eurokka nome de la **ROK-gazet'**-redakcio.

Floréal Martorell

PP
8053 Zürich

**KARAJ GEARTISTOJ DE ARTO-ALFABETA**

Jen kelkaj informoj rilate al ekspozicio de ARTO-ALFABETA 1996, en la kongresdomo de BIELO:

1. Dimanĉe, la 21-an de aprilo 1996, post 1500h alporto de la artverkoj kaj starigado de la ekspozicio en kunlaboro de Peter Fraefel.
2. Lunde, la 22-an de aprilo 16.00h gazetara konferenco en la kongresdomo de BIELO. Ĉiuj artistoj povas partopreni.
3. Lunde, la 22-an de aprilo 20.00h inaŭguro de la ekspozicio ARTO-ALFABETA 1996. 18.00-19.30h en la restoracio de la kongresdomo, vespermanĝo kaj kafo.

MOLGA-STATUTOJ:
Nun ili ne nur ekzistas en ĉina,rusa kaj esperanta lingvoj, sed ankaŭ en la pola lingvo.Kuraĝa Esperantisto tradukis ilin kaj proponis al la registaro, ke Pollando prezentu ilin, por konsultado, al la ĝenerala asembleo de UN. -PZW-

---

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 4/96 estas la 5-a de junio 1996.**

---

**Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13**